

Letero de Hector Hodler al Edmond Privat
Claude Gacond, 306-a radioprelego, 1969.08.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Inter la riĉaĵoj de la Ĉambro Edmond Privat en la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds troviĝas ĝis nun nepublikigitaj leteroj. Jen letero, kiun skribis Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio, al sia amiko Edmond Privat. Ni estas en la jaro 1908, kiam UEA estas ĵus kreita. La Dresdena Universala Kongreso ne ankoraŭ okazis. Edmond Privat troviĝas en Nov-Jorko. Dato de tiu letero : 9-an de junio 1908. Aŭdu la ĉefan parton de tiu letero :

A.- *Kara Amiko,*

Cl.- *Mi ĵus ricevis vian leteron kaj rapidas ĝin respondi.*

A.- *Skribi pli frue mi ne havis tempon, ĉar mi vere estis okupegata de ĉiuj Esperantistaj aferoj. [...] Kun la personoj, kiujn ni varbis, ni povos fari ŝatindan laboron sur vojo ankoraŭ ne sekvita, kaj kiu laŭ mia opinio fariĝis necesa.*

Cl.- *Ni neniel volas eminentulojn, kiuj donas nur sian nomon, sed personojn, eminentajn aŭ ne, kiuj laboros kun preciza plano kaj konscio.*

A.- *Pri la U.E.A. vi povas eklegi en la dokumentoj, kiujn mi sendis al vi.*

Cl.- *Via projekto de Instituto por la instruado de Esperanto estas interesa, kaj mi opinias, ke oni povas kunigi tiun aferon kun la U.E.A.*

A.- *Jen kiamaniere mi vidas la aferon, kvankam mi ankoraŭ ne pensis pro ĝi longe : kiel vi scias, nia laboro estas dividata laŭ diversaj fakoj kompareblaj kun ministraĵoj !*

Cl.- *Ni havas nun nur 3 fakojn, sed post kelka tempo ni intencas plimultigi ilian nombron, ĉu per onigo de la jam ekzistantaj, ĉu per kreado de novaj.*

A.- *Ni havas verŝajne : 1. Administrado ; 2. Financoj ; 3. Konsuloj ; 4. Esperanto-Oficejoj ; 5. Turismo ; 6. Esperanto-Kolonioj ; 7. Komerco, dungado, ktp ; kaj eventuale 8. Propagando ; 9. Instruado.*

Cl.- *Laŭ mia opinio, oni povus kunigi tiun lastan fakon **kun** via afero.*

A.- *Ĉiu fako estas direktata de unu komitatano, kiu elektas sub sia respondeco ĉiujn kunlaborantojn, kiujn li juĝas utilaj.*

Cl.- *Por plenumi nian laboron, ni havas en kiel eble plej multaj lokoj Delegitojn kaj Subdelegitojn, kiuj klopodas por starigi en sia regiono ĉiujn servojn organizatajn de la U.E.A. kaj por tio elektas la bezonatajn helpantojn.*

A.- *Ĉar tiuj Delegitoj ricevas parton de la kotizaĵoj kaj estas elektataj de la anoj de sia regiono, ili estas devigataj respondi la komunikaĵojn de la komitato kaj agi laŭ ĝiaj instrukcioj.*

Cl.- *Cetere, ni volas nur homojn deciditajn por serioza laboro, kaj ĉiujn Delegitojn, kiuj ne respondas aŭ ne agas, ni anstataŭigas per aliaj – laŭ leĝaj formoj kompreneble.*

A.- *Pri tiu organizo vi cetere povos legi sufiĉe longe en **Esperanto** kaj en la projekto de definitiva regularo, kiujn mi sendos al vi.*

Cl.- *Rilate al la fako pri instruado, oni povas tuj de nun fari grandegan kaj vere utilan laboron, ĉar ĝi estos **internacie** organizata, aranĝata laŭ certa plano, kaj ne kiel ĝis nun forlasata al ĉiuj hazardoj de disa agado.*

A.- *Jen kion oni povus fari : Vi estus Komitatano por Instruada fako.*

Letero de Hector Hodler al Edmond Privat
Claude Gacond, 306-a radioprelego, 1969.08.20 & 23

Cl.- *Vi estus plena estro de via fako – laŭ la limoj de la regularo, kiu estas tre larĝa ! kaj elektus ĉiujn helpantojn necesajn : Estus bone – ĉar ni deziras, ke la aferoj estu tre zorge kaj orde farataj – ke vi havu iun personon diligentan, kiu prenos sur sin la korespondan laboron kaj la pure materialajn aferojn (la U.E.A. pagos la elspezojn), kiujn, mi kredas, vi ne tre ŝatas.*

A.- *Ni mem prenas sur nin la presadon de la cirkuleroj, ktp. aŭ uzos la ĵurnalon, por ĉiuj komunikaĵoj al la Delegitoj.*

Cl.- *Vi do bezonos nur organizigi per niaj Delegitoj Esperanto-Kursojn en ĉiu urbo, kie ĝi estas ebla, starigi kvazaŭan Esperanto-lernejon en ĉiu regiono.*

A.- *Tiamaniere oni povas preskaŭ samtempe organizi kursojn en multegaj urboj ; kaj en la fino de la kursoj, la lernintoj ne estos kiel ĝis nun lasataj al la cirkonstancoj kaj al la hazardo sed estos envicigataj en U.E.A., partoprenos en la internaciaj ekskursoj, vojaĝoj, k.c. organizataj de ĝi, povos vojaĝi kun la certeco, ke ili ĉie trovos UEAanojn, kiuj helpadas al ili, ktp. ktp.*

Cl.- *Oni tiel kunigas propagandon de Esperanto kaj utiligadon.*

A.- *Kompreneble, tio postulas laboradon, sed mi konvinkiĝis, ke nuntempe ĝi estas pli facile realigebla, ol oni supozas.*

Cl.- *La ĉefa afero estas, ke iu povu viziti sufiĉe ofte la Delegitojn, kvazaŭ inspekti ilian laboron en la nomo de la U.E.A.*

A.- *Nun mi opinias, ke ĉar vi estas vojaĝema, vi tre bone taŭgus por tio. Kompreneble, nun, nia afero ne estas riĉa kaj ne povas pagi la elspezojn, sed vi povas fari kursojn, kiel ĝis nun, kaj oni povas prave esperi, ke post kelka tempo de serioza agado, nia afero estos sufiĉe fortika, por ke ĝi povu monhelpi siajn laborantojn.*

Cl.- *Bonvolu do pripensi la aferon kaj **respondi al mi kiel eble plej baldaŭ pri tio.***

A.- *Ni havos kunvenojn en Dresdeno, sed mi deziras scii vian respondon multe antaŭe.*

Cl.- *La U.E.A. organizas diversajn vojaĝojn al la kongreso.*

A.- *Mi do partoprenos en unu el ili tra Lyon, Genève, Zürich, Praha, Dresden. Reveno tra Berlino, Frankfurt, Basel (aŭ tra München, laŭplaĉe) [...]*

Cl.- *Pro la ĵurnalo mi ne povas foresti tro longe.*

A.- *Aliparte mia monujo estas ŝancela.*

Cl.- *Ĉiumonate mi devas elspezi 700 frankojn, kaj ofte mi tute ne enspezas tian sumon.[...]*

A.- *Hector Hodler ankoraŭ skribis en tiu letero pri la konfliktoj kun la reformistoj. Ni estas en 1908. Ido ĵus naskiĝis, kaj la adeptoj de tiu konkurenca lingvo provas uzi la esperantajn organizaĵojn por disvastigi sian skismon. La kreo de UEA far Hector Hodler savis la esperantan mondon de la lingvaj disputoj. Ĝi turnis la rigardojn al necesaj agadoj. Ĝi donis al la esperantistoj konkretajn taskojn.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*